# El la GDR-eldonoj de „Paco" 1966–1989

En GDR entute aperis 25 numeroj de la internacia magazino „Paco", organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). La unua numero aperis antaŭ la reoficialigo de Esperanto en GDR sub la redakto de Karl Maier kaj Ludwig Schödl en la jaro 1960. Ĝi estis 10-paĝa kaj aperis en 6.000 ekzempleroj. Ĝin subvenciis la siatempa Germana Packonsilantaro. En la jaro 1965 fondiĝis „Centra Laborrondo Esperanto en Germana Kulturligo". Komenciĝis la laŭleĝa periodo de Esperanto en GDR. Ekde 1966 ĉiujare aperis luksaj numeroj de „Paco" en kunlaboro inter Kulturligo kaj la eldonejo „Zeit im Bild" en Dresden. La lasta numero el tiu serio aperis en 1989. Ĉiu kajero estis A-4-formata, 32–40-paĝa, riĉe ilustrita, presita sur bona papero. La kajero de 1966 estis 32-paĝa, en 1967 kaj 1968 36-paĝa. Ekde 1969 ĝis 1989 ĉiuj kajeroj estis 40-paĝaj. Do entute la 24 kajeroj ampleksas 944 paĝojn. La eldonkvanto estis ĝis 1985 6.000 ekz., ekde 1986 5.000 ekz. La enhavo estis varia. En ĉiu kajero enestis artikoloj pri la internacia politika situacio, pri GDR, pri kulturaj temoj, pri interlingvistiko/esperantologio kaj pri aliaj esperanto-rilataj problemoj. Ne mankis recenzoj kaj beletraj originalaĵoj kaj tradukaĵoj. Sendube, se oni nun trarigardas la politikajn materialojn, ili grandparte ne eltenus la rigoran ekzamenon de la historio. Tamen, multaj aliaj materialoj ankaŭ hodiaŭ estas interesaj. Pro tio ni publikigas elekton de la plej interesa materialo el la 24 kajeroj de la GDR-eldono de „Paco". Ni notis la kontribuojn laŭ kronologia sinsekvo:

**1. Historio de GDREA**

- R. Graetz: Esperanto-amikoj de GDR por la paco. 1970
- R. Graetz: Dudek jaroj MEM kej la esperantistoj de GDR. 1973
- R. Graetz: 25 jaroj Germana Demokratia Respubliko kaj la laboro de la esperantistoj. 1974
- D. Blanke: Kelkaj informoj pri la atingoj de la esperantistoj en Germana Demokratia Respubliko. 1975
- El la raporto pri la MEM-agado 1973-1976. MEM-sekcio de GDR. 1977
- D. Blanke: Esperantista agado en GDR 1976. 1977
- L. Schödl: En la kvindekaj jaroj. 1989

**2. Historio de la laborista Esperanto-movado**

- B. Keable: Proleta Esperanto-korespondado (PEK). 1969
- D. Blanke: Pri la historio de la internacia laborista Esperanto-movado. 1969
- M. Tretrik: Proleta Esperanto-Servo (PES) kaj EKRELO. 1969

- L. Schödl: El dokumentoj kaj memoroj pri la laborista Esperanto-movado. 1973
- D. Blanke: Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). 1974
- D. Blanke: Pri la kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la evoluo de la Germana-Sovetia amikeco en la tempo de la Respubliko de Weimar. 1975
- D. Blanke: Pri IPE. 1975
- L. Schödl: Ŝiboleto. 1975
- J. Hornö: Pri IPE kaj PEK-laboro, 1981
- L. Schödl: Renkontiĝoj kun amikoj. 1985

### 3. Movado (diversaj temoj)

- S. Podkaminer: Neŭtralismo kaj pseŭdoneŭtralismo en Esperanto-Movado. 1967
- A. Zenkert: Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij, la „patro de la astronaŭtismo" -esperantisto. 1967
- H. Eichhorn: Denove pri „neŭtralismo"... 1968
- O. Bäßler: Eroŝenko. Memore al blinda esperantista poeto. 1970
- Dao Anh Kha: Kelkaj trajtoj pri la Esperanto-movado en Vjetnamio. 1972
- A. Vaiĉiulis: Maksim Gorkij kaj Esperanto. 1976
- CED: Pupteatro kaj Esperanto. 1976
- F. Haiderer: Esperanto en la koncentrejo. 1977
- J. Kozlevĉar: Aktiveco de esperantistoj en koncentrejo Dachau. 1977
- E. Kaminska: Mi travivis inferon. (Pola esperantistino travivis la koncentrejon Oświęcim). 1978
- Intervjuo kun la prezidanto de MEM, I. Pethes. 1979
- J. Sulzycki: Intervjuo kun numero „P 23407" (pri esperantisto en koncentrejo). 1979
- A. Ĥarkovskij: La tria lingvo de la skolto Nikolao Kuznecov. 1981
- D. Blanke: Rememoroj pri Ludwig Renn (pri materialo de Ewald Nier). 1981
- A. Grigorev/N. Aleksiev: Georgi Dimitrov kaj Esperanto. 1982
- HEA: Historia evento de la esperantlingva teatra kulturo. Dum dek tagoj sur la scenejo. 1982
- Letero de Maksimo Gorkij al la blankrusia esperantistaro. 1983
- I. Kulakov: Leo Tolstoj, Esperanto kaj rusia ĝendarmaro. 1983
- F. Wollenberg: La Berlinaj esperantistoj kaj la 750-jariĝo de Berlin. 1987
- H. Tautz: La Monda Jardeko de Kultura Evoluo kaj Esperanto. 1988
- F. Wollenberg: Germanlingva libro kun rilatoj al Esperanto. 1989
- Van Trong: Esperanto–akompananto iranta en la 21-an jarcenton kun la nacioj en Azio-Pacifiko. 1989

### 4. Interlingvistiko (esperantologio/Zamenhofologio)

- D. Blanke: Pri la historio de internaciaj planlingvoj. 1970
- D. Blanke: Kelkaj konsideroj pri argumentado kaj argumentoj. 1971
- R. Graetz: Pri ideologiaj konceptoj de L. L. Zamenhof. 1971
- D. Blanke: Pri neceso kaj utilo de interlingvistikaj esploroj. 1972
- Á. Rátkai: Marx, la Internacia Laborist-Asocio kaj la lingva problemo. 1973
- E. A. Bokarev: Fonemo kaj sono en Esperanto. 1974
- H. Sauerbrey: Esperanto-literaturo, ŝtoneto en la mozaiko de la paco. 1975
- D. Blanke: Oceano da informoj. 1975
- N. Danovskij: Scienca informo–plej perspektiva kanalo. 1975
- J. Kořinek: Reguloj de Esperanta fonetiko. 1975
- J. Kořinek: Esperanto–ĉu lingvo preciza? 1975
- H. Seppik: Pri neologismoj. 1975
- D. Blanke: La antikvaj lingvoj kaj la problemo de la internacia lingvo. 1976
- J. Petrin: La rolo de prepozicioj en Esperanto. 1976
- A. Slanina: La akuzativo. 1976
- I. Kulakov: Renkontiĝo kun poligloto (= Paul Ariste). 1976
- S. N. Podkaminer: Socialismo kaj internacia lingvo. 1977
- W. Gilbert: Pri landnomoj en Esperanto. 1977
- D. Blanke: „Problemoj de interlingvistiko". Tipologio kaj evoluo de internaciaj artefaritaj lingvoj. Kaj iom da kundiskuto. (Temas pri recenzo al M. Isaev [Red.]: Problemy interlingvistiki. Moskva: Nauka 1976, 160 p.). 1977
- D. Blanke: Interlingvistiko kaj esperantologio: bibliografiaj notetoj. 1977
- P. Balkanyi: Ĉu ekzistas ideologio de Esperanto? 1977
- E. A. Bokarev: La spontana kaj la konscia en la lingvo. 1978
- N. Danovskij: Aktiveco kaj „aktivecoj". 1978
- Lingvaj problemoj en Unuiĝintaj Nacioj. 1978
- Eminentulo de Esperanta tradukarto – Sergej Grigorjeviĉ Rubljov, 1977
- W. Gilbert: Esperanto kontraŭ naciaj lingvoj? 1979
- D. Blanke: Pri la „interna ideo" de Esperanto. 1979
- D. Blanke: Ludwig Renn–la esperantisto. 1980
- E. Kehlet: Denaskaj Esperantistoj. 1980
- F. Häusler: La sinteno de J. Baudouin de Courtenay al la problemo de mondaj helplingvoj. 1980
- C. Murgin: L. Zamenhof dum la revolucio en Rusio (1905 ĝis 1907), 1980
- D. Blanke: Pri la problemo de laŭplana influado je la lingvoevoluo fare de la homo. 1981
- D. Blanke: Pri planlingvoj en kelkaj sciencaj verkoj de GDR. 1981
- C. Murgin: L. L. Zamenhof dum la revoluci-prepara periodo (1910–1914). 1981
- K. Schulze: Kelkaj rimarkoj pri transitivaj verboj. 1981
- B. Golden: Pri la influo de la germana lingvo sur Esperanton. 1981
- B. Golden: Pluaj rimarkoj pri la transitiveco de verboj. 1982
- K. Schulze: La aventuro de Faŭst-traduko. 1982
- D. Blanke: Esploroj pri sociaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia parolantaro. 1982
- M. Lennartz: La planlingva ideo kaj scienc-fikcia literaturo en GDR. 1982
- C. Murgin: L. L. Zamenhof pri la interna ideo de la esperantismo. 1982
- P. Levsen: Grava teksto de Karl Marx en diversaj tradukoj. 1983
- R. Corsetti/M. La Torre: Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado. 1983
- D. Blanke: Interlingvistikaj libroj el Soveta Unio. 1983
- C. Murgin: L. L. Zamenhof pri la internacilingva ideo. 1983

- C. Murgin: Pri generalo Mangado. 1983
- C. Murgin: Historio de Mondpaca Esperantista Movado. 1984
- A. Hanke: Grava teksto de Karl Marks. 1984
- D. Blanke: Lingvoplanado en planlingvo. 1984
- C. Murgin: L. L. Zamenhof pri la perfektigo de la homaro. 1984
- T. Ejsmont: Ligoj inter la Esperanto-movado kaj edukado por la paco. 1985
- W. Dehler: Rilatoj inter planlingvoj kaj internacia terminologi-normigo. 1985
- F. Wollenberg: La realismo de revulo. Pri la historie optimismaj tendencoj en la pensado de Zamenhof. 1985
- B. V. Tokarev: V. I. Lenin pri lingvoj. 1986
- F. Wollenberg: La korektita Zamenhof. Pri la Zamenhof-kompreno de Ito Kanzi. 1986
- A. Vaitilavičius: Denove pri la Marx-teksto. 1986
- B. Golden: Ankoraŭ du tradukoj de la „Marx-teksto". 1986
- C. Murgin: Rompu la murojn inter la nacioj kaj rekonstruu la homaron! 1986
- M. Malovec: Pri traduka arto. 1987
- F. Wollenberg: La disputo pri la Zamenhofa heredaĵo. 1987
- C. Murgin: Puŝkin, Zamenhof kaj nia epoko. 1987
- B. Golden: Ĉu Zamenhof estis pola okulisto? 1988
- D. Blanke: Socipolitikaj influoj kaj la Internacia Lingvo—ĉu socisistemaj kaj politikaj ideologiaj diferencoj reflektiĝas en Esperanto aŭ kreas lingvo-variantojn? 1988
- F. Wollenberg: Grava kontribuo al moderna Zamenhof-bildo. 1988
- J. Amouroux: Emile Javal. 1989
- F. Wollenberg: Wilhelm Foerster—eminenta sciencisto kaj esperantisto. 1988

**5. Beletro**

**5.1. Originalaĵoj**

- A. Logvin: Kie Lermontov duelis. 1971, poemo
- E. Kopietz: Jenny Marx. El ŝia vivo. 1972, eseo. (Tiu ĉi eseo aperis kiel broŝuro ĉe Esperanto-Centro Paderborno, bedaŭrinde kun lingvaj fuŝaĵoj, ŝulditaj de la Centro.)
- M. Gergely: Soleca telefonulo, 1976, novelo
- K. Kalocsay: Alkemio. 1976, poemo
- A. Logvin: Kanto al la lumo. 1977, poemo
- A. Logvin: Koŝmara sonĝo. 1978, poemo
- T. Denetkin: Porpaca flugfolio. 1978, poemo
- A. Logvin: Omaĝe al Roald Amundsen en nekonatecon... 1979, poemo
- L. Renn: Kontraŭmilita kanto. 1980, poemo
- L. Renn: Senlaborula kanto. 1980, poemo
- K. Kalocsay: Ezopa fablo. 1981, poemo
- J. Balbin: Mauthausen. 1981, poemo
- M. Arnold: Homo kaj sezonoj. 1981, poemo
- O. Knichal: Vizito ĉe Hemingway. 1984, poemo
- M. Arnold: La ordono. 1982, rakonto
- M. Arnold: Trifon'. 1984, poemo
- M. Arnold: Jubilea parolado. 1984, poemo

**5.2. Tradukaĵoj**

- B. Brecht: Se la ŝarkoj estus homoj. Trad. H. Schmid, 1969, eseo
- J. Becher: Arnold Zweig. Trad. Karl Schulze, 1969, poemo
- B. Brecht: La soldato de La Ciotat. Trad. K. Schulze, 1970, rakonto
- B. Brecht: La du filoj. Trad. K. Schulze, 1970, rakonto
- E. Kästner: Ĉarma vespero. Trad. K. Schulze, 1970, rakonto
- H. Heine: La sileziaj teksistoj. Trad. K. Kalocsay, 1971, poemo
- J. Marti: Guantanamera (kanzono), 1972
- J. Jevtuŝenko: Dek tri milionoj da tunoj. Trad. K. Gusev. 1973, poemo
- B. Brecht: Kanzonoj el la „Trigroŝa Opero", en traduko de K. Schulze: 1973, 1975, 1978, 1982, 1983, 1984
- B. Brecht: Parabolo de l' Budao pri la brulanta domo. Trad. K. Schulze, 1974, poemo
- B. Brecht: Anakronisma procesio aŭ libero kaj democrasy. Trad. K. Schulze. 1975. poemo
- Th. Mann: La fino de Cipolla. El la novelo „Mario kaj la magiisto". Trad. K. Schulze, 1975
- B. Waterstraad: Ĉefanĝelo en feltbabuŝoj serĉata. Trad. K. Schulze, 1975, rakonto
- M. Gorkij: Kanto pri ŝtormobirdo. Trad. S. Obruĉev, 1976, poemo
- M. Lermontov: Nuboj. Trad. A. Logvin, 1976, poemo
- G. Boccaccio: La kvara novelo de la kvina tago. Trad. G. Waringhien, 1976, novelo
- B. Brecht: Persikfloro. (El la „Trigroŝa Romano", trad. de. K. Schulze), 1976
- B. Brecht: Infana Kruciro 1939. Trad. K. Schulze, 1977, poemo
- J. Haŝek: La brava soldato Ŝvejk lernas manipuli fulmkotonon. Trad. W. Hofmann, 1977
- M. Gorkij: Kanto pri la falko. Trad. N. Andrianova, 1978, poemo
- M. Gorkij: Feino. Trad. N. Fedotov, 1978, poemo
- E. Kahler: Ĉiela rolo. Trad. K. Schulze, 1978, rakonto
- B. Waterstraad: Se mi ne sentus tiom da skrupuloj... mi skribus belan novelon. Trad. K. Schulze, 1978, rakonto
- E. Weinert: Jam foje estis tia komenciĝo. Trad. M. Arnold, 1979, poemo
- E. Kästner: Parolas maljunulo. Trad. Horst Michling, 1979 + 1984, poemo
- E. Weinert: La fablo pri la dia mondordo. Trad. M. Arnold, 1979, poemo
- E. Hemingway: Multjarulo ĉe ponto. Trad. H. Buth, 1979, rakonto
- B. Jentzsch: La il-flago. Trad. K. Schulze, 1980, rakonto
- E. v. Bauernfeld: La malsana leono. Trad. M. Arnold, 1980, poemo
- H. Heine: Obstina komenco. Trad. M. Arnold, 1980, rakonto
- K. Tucholsky: La homo. Trad. H. Buth, 1980, rakonto
- K. Tucholsky: La pulo. Trad. M. Arnold, 1980, rakonto
- L. Thoma: La milito. Trad. M. Arnold, 1980, rakonto
- E. Weinert: Pri diversspecaj bestoj. Trad. M. Arnold, 1980, poemo
- W. Bredel: Venko super Goethe. Trad. M. Arnold, 1980, rakonto
- J. W. Goethe: Tri tradukoj el la „Faŭsto" (trad. B. Mirski, N. Barthelmess, K. Schulze), 1980
- A. S. Puŝkin: Profeto. Trad. N. Fedotov, 1980, poemo
- A. S. Puŝkin: Al Anna Kern. Trad. N. Fedotov, 1980 poemo
- H. Knobloch: Tio, kio valoras. Trad. H. Buth, 1981, rakonto

- G. Topirceanu: La bolado de la korvoj. Trad. J. Nagy, 1981, poemo
- H. Heine: En la mirinde bela Maj'. Trad. Kalocsaj, 1981, poemo
- H. Heine: Ne amas vi. Trad. K. Kalocsay, 1981, poemo
- H. Heine: Pinarbo. Trad. K. Kalocsay, 1981, poemo
- W. Borchert: La keglejo. Trad. H. Buth, 1982, rakonto
- W. Busch: La dispartigo. Trad. E. Würker, 1982, poemo
- W. Busch: Armita paco. Trad. W. Hofmann, 1982, poemo
- W. Busch: La memkritiko. Trad. W. Hofmann, 1982, poemo
- J. W. Goethe: Prometheus. Trad. K. Kalocsay, 1982, poemo
- H. Dárbe: Depozicio de la viktimoj de la svastiko kaj por ilia memoro 1941. Trad. A. Kubulnieks, 1982, poemo
- E. Weinert: Dimitrov. Trad. M. Arnold, 1982, poemo
- E. Weinert: Paco estas pli forta. Trad. M. Arnold, 1983, poemo
- J. R. Becher: Migruloj. Trad. E. Würker, 1983, poemo
- L. Fürnberg: Ĉiu revo. Trad. E. Würker, 1983, poemo
- W. Borchert: La pano. Trad. H. Buth, 1983, rakonto
- J. W. Goethe: Dornrozeto. Trad. K. Kalocsay, 1983, poemo
- M. Treblig: Se vi silentas! Trad. U. Werner, 1984, poemo
- P. Schütt: Pacludoj. Trad. U. Werner, 1984, poemo
- P. Neruda: La United Fruit Co. Trad. R. Passos Nogueira, 1984, poemo
- P. Neruda: La morto. Trad. R. Passos Noguiera, 1984, poemo
- W. Borchert: Provu! Trad. H. G. Kaiser, 1984, poemo
- H. Dorbe: Adiaŭaj linioj de violinistino al Felix Mendelssohn-Bartholdy. Trad. A. Kubulnieks, 1984, poemo
- B. Brecht: Al la naskiĝontoj. Trad. R. Passos Noguiera, 1984, poemo
- B. Brecht: Rakontoj de sinjoro K. Trad. K. Schulze, 1984
- B. Brecht: Demandoj de leganta laboristo. Trad. M. Arnold, 1984, poemo
- B. Brecht: Ĉe la gravuloj. Trad. R. Passos Nogueira, 1984, poemo
- M. Kohlhaase: Invento de lingvo. Trad. L. Knöschke, 1985, novelo
- M. J. Lermontov: Profeto. Trad. N. M. Fedotov, 1986a, poemo
- J. Rennert: Longa amkanto pri la kurtviva homo. Trad. W. Hofmann, 1986, poemo
- M. Biskupek: Nigra-blanka rakonto. Trad. H. Koch, 1986
- W. Borchert: Tiam nur eblos. Trad. J. Schulze, 1986, rakonto
- J. Hašek: Interveno de la brava soldato Ŝvejk en la mondmiliton. Trad. V. Vaňa, 1986
- W. Ilberg: Kristnaska legendo. Trad. H. Rogazewski, 1986, rakonto
- G. Topîrceanu: La balado de l' morto. Trad. J. Nagy, 1986, poemo
- G. + J. Braun: Viro kun gitaro. Trad. K. Schulze, 1986, novelo
- A. Scorell: La hundo Teofilo. Trad. M. Arnold, 1987, rakonto
- K. Tucholskij: Geedzoj rakontas spritaĵon. Trad. M. Arnold, 1987, rakonto
- Roda Roda: La ĉambro en la Bogna-strateto. Trad. M. Arnold, 1987, rakonto
- H. Suislepp: Kontraŭmarŝoj. Trad. J. Ojalo, 1988, poemo
- E. Sperantia: Sed tamen. Trad. C. Dominte, [illegible] poemo
- E. Sperantia: Krucmilito. Trad. C. Dominte, 1988, poemo
- N. Hikmet: La malgranda morta knabino. Trad. M. Arnold, 1988, poemo
- M. Kyber: Profesoro bortruo. Trad. M. Arnold, 1989, rakonto

Krom tio ĉiu numero de „Paco" entenis multajn korespondanoncojn el jenaj landoj: Alĝerio, Argentino, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉinio, ĈSSR, Francio, GDR, Hispanio, Hungario, Irako, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Kolumbio, Kubo, Mongolio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Sovetunio, Suda Koreujo, Svedio, Usono, Venezuelo, Vjetnamio.
La respondeca redaktoro de la kajeroj 1966–1970 estis Eugen Menger. Ekde la kajero 1971 la redaktoro estis Detlev Blanke.

Kompilis D. Blanke

---